Universala Esperanto-Asocio

**Ekzamenoj, kolokvo**
**kaj libroluktado**

**Estrara Subteamo: MOVADO**

*Estrara Komuniko EKO 2016-17 sendita el Subotica, la 4an de junio -.la kvina Tutmonda Ekzamentago*

*Al: Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, ILEI-aktivuloj, TEJO-estraro, gazetaro, listoj kaj unuopuloj.*

# Iluminiĝon serĉas ekzamenaj kandidatoj

Landon post lando la matenaj sunradioj en la 4a de junio atingis la 15 urbojn, kiuj partoprenas en la 5a Tutmonda Ekzamentago de la ŝtate agnoskataj ekzamenoj de UEA/ITK. Tiuj ekzamenoj konformas enhave kaj organize kun la preskriboj de la Komuna Eŭropa Referenckadro (KER).

La unua lumigita urbo de la KER-mondo estas Tokio, la ĉefurbo de Japanio, poste Busan, en Koreio, sekvate post kelkaj minutoj per ĝia ĉefurbo, Seulo. Venas al la vico Eŭropo, kies plej orienta reprezentanto estas Subotica en Serbio – de kie venas ĉi tiu raporto – poste Hago en Nederlando, Parizo, Limoĝo kaj Lannion en Francio, Londono en Britio kaj Sabadell en Hispanio/Katalunio. La malfruvekiĝantoj estas Bonaero en Argentino, Maceio kaj Kuritibo en Brazilo, Managvo en Nikaragvo kaj laste Sanfrancisko en Usono. Entute temas pri 15 lokoj en 11 landoj, kie submetas sin al ekzamenado pli ol 120 kandidatoj, je ĉiuj tri niveloj: B1, B2 kaj C1.  Tra la ok jaroj de la ekzamena programo ĝis la fino de 2015 estas registritaj 1687 sukcesintoj. el 66 landoj.




En Subotica ariĝis kvin kandidatoj, unu el kiuj vojaĝis pli ol 12 horojn por partopreni. Ĉiu nivelo estas testata. La foto montras la kandidatojn, ekzamenantojn kaj (maldekstre) la direktoron kaj (dekstre) la vicdirektorinon de la Politeknika Lernejo, kie okazis la sesio. Aldone al la streĉ(et)a mateno da ekzamenado okazos festa posttagmezo kun muziko, prezentaĵoj kaj

allogaĵoj, al kiuj urbanoj estas invititaj. La sesio estas raportita kaj raportota per televidaj kaj radiaj intervjuoj i.a. kun la surloka organizanto, s-ino Aranka Laszlo, kune kun gazetartikoloj. La aktiva partopreno de UEA tie estas plenumita per la asocia vic-prezidanto, kiu samtempe estas rajtigita ekzamenanto.


Ĝuste nun estas arigataj fotoj kaj raportoj el la diversaj ekzamenlokoj, pri kio eblos pli detale legi ĉe <edukado.net>.

## Internacia scienca kolokvo en Rumanio: invito al partopreno

Tio okazos en la 11a kaj 12a de novembro 2016 en la Okcidenta Universitato de Timişoara. La Esperanto-Asocio de Rumanio (EAR), kunlabore kun tiu universitato proponas, pere de tiu ĉi kolokvo, estigi komunikponton inter esploristoj kaj universitatanoj el diversaj landoj pere de tiu lingvistika vehiklo. Estas invitataj partopreni la kolokvon universitatanoj, esploristoj, studentoj, ĉu esperantistoj, ĉu adeptoj de la lingvo, per prelegoj el siaj fakoj. La laborlingvoj estos la rumana kaj Esperanto.

La **Scienca komitato** por la aranĝo estas jena: Dorin Cosma, Prof. dr. kajLuminița Frențiu, Doc. dr., ambaŭ el la Okcidenta Universitato, Timişoara; Sara Konnerth, Doc. dr., Universitato „Lucian Blaga”, Sibiu; Mariana Pitar, Doc. dr., Okcidenta Universitato, Timişoara; Stefan MacGill, vicprezidanto de UEA; Mireille Grosjean, prezidanto de ILEI; Aurora Bute, prezidanto de EAR.

La aktiva partopreno de UEA en la aranĝo havas du ĉefajn celojn. Unue, flegi novspecan kunlaboron inter landaj asocioj en tiu mondparto, due starigi pli fortajn ligojn (ne nur fakajn sed ankaŭ organizajn) inter la multaj universitatoj en la mondo, kie okazas iuspeca interlingvistika agado kiu inkluzivas atenton al Esperanto. Tia praktika ligado povos esti neformala, sed povus ankaŭ celi al la formiĝo de komuna komisiono de UEA/CED/ILEI por la universitata kunordigo. UEA jam nun engaĝas sin por helpi al universitataj agantoj superi vojaĝobstaklojn, por tamen povi partopreni kaj kontribui, tiel ke la aranĝo vere havu internacian karakteron.




### Pezaj luktoj kontraŭ paĝnombroj legendaj

Finiĝis la 40a Sumoo konkurso pri librolegado, kiun ni antaŭanoncis per EKO-komuniko. Sume la nombro de legemaj partoprenantoj atingis 274 el 26 landoj. Elstaras Japanio (63), Koreio (42), francio (37, brazilo (17), Pollando (15), Vjetnamio (14 kaj Svislando (12). La sekva sumoo okazos ekde la 3a de julio ĝis la 10a de julio dum 8 tagoj.

Vortoj: 601

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj ĉe: http://uea.org/vikio/index.php/Komunikado_kun_LA,_FA...

PDF farita de Nuance Power PDF